

120 jaroj de Esperanto en Brno

1901 – 2021



La lastaj dek jaroj 2011 – 2021

aldono al la broŝuroj

Cent jaroj de Esperanto en Brno 1901 – 2001

110 jaroj de Esperanto en Brno 1901– 2011

Esperantista Klubo en Brno

2021

Okaze de la 120-jara jubileo de organizita Esperantista movado en Brno

sabate la 18-an de septembro 2021
en ofickonstruaĵo Nosreti, la 3-a etaĝo
Křenová 409/52, Brno

10.00 Alveno de partoprenantoj

10.30 Komenco

- Lanĉo de libro Kosmofabeloj, kiun verkis Gabriela Kopcová. Esperantigis Miroslav Malovec, eldonis KAVA-PECH (gvidos Petr Chrdle)
- Konciza historio de Esperantista klubo Brno (Miroslav Malovec)
- Flaŭro de Brno (Oldřich Arnošt Fischer)
- La programo estos akompanata de kantado de Pavla Dvořáková.

Fino ĉirkaŭ 15.00

Eblos aĉeti librojn eldonitajn de eldonejo KAVA-PECH
kaj Esperantista klubo Brno.

Post fino de la programo promeno tra la urbocentro. Estos
montritaj kelkaj lokoj gravaj por esperanta-movado en Brno.

Tagmanĝo kaj refreŝigaĵo kovritaj per la kosto.

Kroniko de Esperanto en Brno en la jaroj 2011 – 2021

(aldono al la broŝuroj

Cent jaroj de Esperanto en Brno 1901 – 2001

kaj

110 jaroj de Esperanto en Brno 1901 – 2011)

2011: La klubo festis **110 jarojn** de sia ekzisto. Ĉe la asocia retejo M. Malovec fondis paĝon **Memoro de la ĉeĥa Esperanto-movado** kun **500 personoj** kaj ilia konciza karakterizo. En la ĉeĥa vikipedia gazeto **Wikimedium** aperis intervjuo kun M. Malovec pri fondo de la ĉeĥa Wikipedia en 2002. J. Vojáček reprezentis Esperanton ĉe stando Zooparadizo dum hundo-eksponzio en Brno. J. Werner verkis kaj eldonis *Ladistaj produktoj en konstruado*. Pavel Lehký prelegas pri komunikado en *Česká konference 3*, nunjare en Kutná Hora. Miroslav Hruška prizorgis esperantan tekston por **Integrita trafika sistemo de Sudmoravia Regiono** (KORDIS). En la asocia kongreso en Šumperk Miroslav Malovec fariĝis honora membro de ĈEA. Dum **Vikimano** en Svitavy aperis M. Malovec en televido. Jarfine ni partoprenis en **Zamenhof-festo** en Vieno (Trzosová, Hruška, Malovec, Vojáček)

2012: La Societo festis **10 jarojn** de sia ekzisto, parte en la klubejo, parte per ekskurso al la digolago kaj la kastelo Veverčí. J. Vojáček trifoje parolis en la radia programo *Apetýt* kaj prizorgis ekspozicion pri Esperanto (*Ĉu Esperanto estas morta lingvo?*) en Moravia Landa Biblioteko, poste en Sudmoravia Magistrato kaj Filozofia Fakultato de Masaryk-Universitato. Ĉe la sama fakultato li gvidis kursojn de Esperanto kaj de interlingvistiko. J. Werner eldonis kolekton de siaj tradukoj kaj eseoj sub la nomo *Versa Neversa Mozaiko*. Sed ĉefe preparis por eldono Ĉeĥan-esperantan frazeologion de Josef Cink. Niaj membroj prelegis dum OSIEK-konferenco en Svitavy, dum KAEST en Modra apud Bratislava kaj dum Zamenhof-festo en Vieno. En la retejo aperis nova paĝo *Elŝutu* kun multaj prelegoj kaj aliaj tekstoj produktitaj de esperantistoj en Brno. Gazeto Fénix de Ĉeĥa-ĉina Societo publikigis artikolon de M. Malovec *Tradukoj de la ĉeĥa literaturo en la ĉinan per Esperanto*. P. Lehký laboras pri projekto de pura akvo el la aero kun la esperantlingva komerca nomo Sanakvo. Kun Max Kašparů kreis M. Malovec verketon **Konciza psiĥiatria vortaro**.

2013: En januaro ing. Werner partoprenis 3-an internacian konferencon pri rusoj en Moravio; En februaro fine aperis la longe preparata **Ĉeĥa-Esperanta frazeologio** de Josef Cink. En majo M. Blahuš, M. Hruška, M. Malovec kaj V. Zouzalík partoprenis vikipedian trejnadon en Partizánske. La 26-an de julio Marek Blahuš parolas en televido Ostrava; somere komenciĝas rekonstruo de la klubejo en Starobrněnská; la 7-an de septembro grupo el Brno (Fischer, Frýbert, Malovec, Trzosová, Werner) partoprenas en 90-jariĝo de EK Přerov; en septembro aperas libro Otokar Březina: **Moje matka – Mia patrino** en 14 lingvoj, kiun preparis Viktor Dvořák el Moravské Budějovice kaj Miroslav Malovec el Brno; la libron akompanas kompakta disko pri vidindaĵoj de Regiono Vysočina; inaŭguro de la libro en Jaroměřice nad Rokytnou la 14-an de septembro; Jan Werner eldonas **Historiaj ĉevroj**; Oldřich A. Fischer enĉeĥigis **Arne, la ĉefido** (KAVA-PECH); studenta teatro DOMA en Svitavy ludis en UK Rejkjaviko Ĉapek-dramon **R.U.R.**, kies partojn kaj reklam-materialojn esperantigis M. Malovec (ĝi jam estis ludata en 2012 dum OSIEK en Svitavy kaj en teatro Polárka en Brno dum teatra festivalo); novembre Radio-Brno invitas por interparolo (Blahuš, Malovec, Vojáček); partopreno en 2-a Internacia Lernejo Bartošovice (Podhradská), en 5-jariĝo de E-muzeo Svitavy kaj en konference de ĈEA en Nymburk; J. Vojáček instruis Esperanton kaj interlingvistikon al 41 studentoj de Masaryk-universitato kaj partoprenis seminarion en Sanremo; dr. Fischer verkis nekrologon pri Rüdiger Sachs

por ĉeĥa faka bestkuracista gazeto *Veterinářství*. Josef Vojáček prelegis kun dr. Fösmeier pri *Metodiko de instruado ĉe AIS* en Universitato de Defendo en Brno. Milan Kolka prilaboris vortareton pri *Gerta malaperis* por instru-programo de Masaryk-universitato. Marek Blahuš estis elektita kiel la plej juna **akademiano (membro de Akademio de Esperanto)**. Miroslav Hruška fariĝis redaktoro de la asociaj **Retkomunikoj**. Trio Viktor Dvořák, Miroslav Malovec kaj Josef Vojáček komunikis kun ministerio de instruado pri eblo instrui Esperanton kiel la **duan fremdan lingvon**.

2014: la 18-an de januaro partopreno en inaŭguro de prelegaro de la 3-a konferenco **Rusoj kaj Moravio** (Fischer, Malovec, Podhradská, Vondroušková, el aliaj kluboj Turková kun Viktor kaj Libuše Dvořák); mortis la honora kluba prezidanto **Zdeněk Hršel** (3.6.2014); Miroslav Malovec ricevis **honoran membrecon de Wikimedia** pro fondo de la ĉeĥa Vikipedio en 2003; la 21a-an de aŭgusto Jan Werner kaj Miroslav Malovec prelegis en juda societo en Brno pri Zamenhof; Josef Vojáček la 24-an de aŭgusto parolis en Radio Brno; Josef Vojáček prelegis en Universitato de Defendo en Brno pri *Enkonduko en interlingvistikon*; la Societo eldonis libron de Jan Werner **Tvorba slov v esperantu**; Miroslav Malovec kun Viktor Dvořák el Moravské Budějovice eldonis libron Otakar Březina **Tajemství bolesti – Mistero de doloro**, kiun ili prezentis en simpozio pri Březina la 19.9.2014 en Prago; Josef Vojáček fariĝis **honora membro de ĈEA** en la asocia kongreso en Prostějov; 13 – 16.11.2014 partoprenis **KAEST 2014** en Modra-Harmonia (Slovakio) tri esperantistoj el Brno: Marek Blahuš (Ciferecigo de la Zamenhofaj adresaroj), Miroslav Malovec (Prilaboro de arkivaĵoj) kaj Václav Zouzalík (Interretaj arĥivoj, Kial kaj kiel uzi Krean Komunajon); la samaj partoprenis ankaŭ la ĉeĥan **Vikikonferencon** en Stelobservejo kaj planetario Brno 19.11.2014, Malovec kiel fondinto de la ĉeĥa Vikipedio, Blahuš kaj Zouzalík inter organizantoj, ĉiuj kiel prelegantoj: Pri estiĝo de ĉeĥa Vikipedio (Malovec), Vikinovaĵoj (Zouzalík), Ombraj trajtoj de Vikipedio, Amuza vikikvizo kun premioj (Blahuš); la kvizon partoprenis nova membrino Vlad'ka Havlíčková; la konferencon ĉeestis ankaŭ esperantistoj el Brno Marie Malá, Josef Vojáček, Martin Sedlák kaj el Slovakio Matej Grochal kun Radoslava Semanová. Novan kluban retejon en **Facebook** kreis Milan Kolka, kiu ankaŭ preparis **ekzercilojn** por ekzerci vortojn.

2015: La klubo aĉetis novan domajnon <http://esperantobrna.cz/>, al kiu Milan Kolka komencis alŝuti tekstojn el la malnova retejo. Forpasis Jarmila Handlová (1926 – 6.1.2015). Oldřich Arnošt Fischer esperantigis kaj eldonigis komedion de Blanka Fišerová **Ĉerkoturneo**, Jan Werner **Terminaron de kanalizacio** kaj romanon **Metamorfozoj** de Věra Nosková (kuntradukis Věra Muchnová). Marek Blahuš fariĝis **rezidento** (kunlaboriganto) de Masaryk-universitato kaj ĉeĥa Wikipedia kaj parolis en la ĉeĥa **Vikikonferenco** en Prago. Malovec ciferecigis la **kluban bultenon** 1952 – 1989 kaj esperantigis la retejon **VEDEM** pri judaj knaboj (1942 – 1945). O. A. Fischer parolis en **Radio Brno**. Malovec helpis savi materialojn el Kilian-domo en Třebíč (parte en Lančov, Svitavy, Brno). Josef Vojáček kompletigis novan lernolibron de KAVA-PECH per ekzercoj.

2016: La komuna jarkunveno de la Societo kaj de la Klubo la 3-an de februaro nuligis la Societon, kiu eniris la Klubon sub la formo de fuzo. La klubo akceptis la nomon **Klubo de esperantistoj Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**. Estis elektita nova komitato: Miroslav Malovec (prezidanto), Milan Kolka (vicprezidanto), Oldřich Arnošt Fischer (sekretario), Bohumila Trzosová (kasistino). En Brněnský deník la 25-an de aprilo 2016 aperis artikolo de redaktoro Martin Vertěši *Umělý mezinárodní jazyk je sblížil. Píší v něm knihy* (La artefarita internacia lingvo ilin kunigis. Ili verkas en ĝi librojn). La retejo **VEDEM** en Esperanto estis solene inaŭgurita la 5-an de majo 2016, tago de viktimoj de holokaŭsto (esperantigis M. Malovec). Novan libron **Kun fotilo inter libeloj (Insecta, Odonata)** preparis Oldřich Arnošt Fischer. Jan Werner eldonis du publikaĵojn: **Terminaro**

de betono kaj de betonistaj laboroj kaj Konstrufaka kolekto; en UK Nitra laboris ankaŭ esperantistoj el Brno (M. Blahuš, M. Hruška, M. Malovec, M. Sedlák, V. Zouzalík), partoprenis ankaŭ M. Kolka, J. Vojáček. Okazis tie ankaŭ du teatraĵoj kun nia partopreno: teatraĵon [El la vivo de insektoj](#) esperantigis M. Malovec kun helpo de traduko de Josef Vondroušek kaj en [Tuŝoj je animo](#) deklamis versojn M. Blahuš. La gazeto [Instinkt](#) publikigis artikolon pri Vikipedio kun mencio pri fondo de la ĉeĥa versio el Esperanto. Oktobra ĈEA-kongreso en Pelhřimov reelektis por la asocia komitato s-anojn M. Hruška kaj M. Malovec. En novembra KAEST en Modra-Harmonia prelegis el Brno Miroslav Hruška (*Sistemo de pruntepreneblaj bicikloj kaj urbo Brno*), Miroslav Malovec (*Esperanto kiel klerigilo*) kaj Václav Zouzalík (*Vikipedio-trejnado*). En la retejo **Bulteno historia** aperas nove enkomputiligitaj historiaj bultenoj ne nur el Brno. En la biblioteka gazeto **Duha 3/2016** aperis artikolo pri Esperanto-bibliotekoj (Malovec) kaj fine de novembro en *Týdeník rozhlas* (Semajngazeto Radio) felietono de verkistino Věra Nosková *Spríznění umělym jazykem* (Konkordiĝintaj per artefarita lingvo) laŭ informoj de redaktoro de Starto, kiu publikigis ŝian rakonton en traduko de Věra Muchnová kaj Jan Werner. **Mortis Adolf Veselý** (30.5.). En la ĉeĥan ni tradukis retejon pri la renesanca sciencisto **Simon Marius**. En memorlibro pri Josef Šemer, israela esperantisto, aperis liaj anekdotoj kolektitaj de Malovec.

2017: en Mahen-biblioteko la 11-an de aprilo prelego pri **Esperanto kaj komunikado** (J. Vojáček, M. Malovec) okaze de 100 jaroj post la morto de Zamenhof (14.4.), venis proksimume dek personoj. M. Malovec enĉeĥigis multlingvan retejon pri **Zamenhof**. La klubo eldonis bibliografion de **Miloš Lukáš** (majstra Esperanto-tradukisto) kompilitan de Zdeněk Hršel (eldonon preparis O. A. Fischer kaj M. Malovec). *Skaraboj, papilioj kaj aliaj insektoj antaŭ objektivo* estas nova libro de O. A. Fischer. KAVA-PECH eldonis libron **Velký esperantsko-český slovník – Granda Esperanta-Ĉeĥa Vortaro**. En la retejo pri historiaj bultenoj aperis junularaj bultenoj, praga bulteno, Pacdefendanto, Medicinaj informoj el 1950-aj jaroj. Miroslav Hruška kun Matěj Nárožný preparis (26.7.) asocian retejon ĉe **Fejsbuko**. En Svitavy aperis libro de Josef Čáp **SVITaVY – Apokryfní pověsti** (Apokrifaj legendoj de Svitavy), en kiu la apokrifo pri Oskar Schindler estis tradukita ankaŭ al la ukraina, rusa kaj Esperanto (tr. M. Malovec). La studenta teatro DOMA el Svitavy ripetis la teatraĵon **El la vivo de insektoj** en UK Seulo. Forpasis Slavomír Barták (22.1.) kaj Eva Hliněnská (9.6.). Malovec enkomputiligis verkojn de Josef Řebíček, *Int. konvencio pri fervojaj person-, pakaj- kaj fretaĵ-trafikoj* (1930) kaj *Abocoregistro de koncernaj komercaĵoj* (ĉeĥa – esperanta – germana, manuskripto).

2018: Inter 8.2. – 4.3. **ekspozicio en Hodonín** „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ preparita de nia ing. Josef Vojáček en oranĝerio; 26.2. **prelego en Mahen-biblioteko** por Kultura Akademiko de Tria Aĝo (Malovec, Kolka, Fischer anstataŭ Vojáček, kiu ĉion aranĝis, sed estis en banurbo Hodonín kiel paciento). La 25.3. Marek Blahuš en televido pri **geneologio**. 7.4. premiero de opero **Sternenhoch** de Ivan Acher en Nova Scenejo de Nacia Teatro en Prago en Esperanto-traduko de Miroslav Malovec (I. Acher muzikigis Esperantan version, kiu fariĝis originalo – 5 spektakloj printempe, pluaj decembre kaj januare); 30.5. aperis artikolo **Esperanto ne estas morta lingvo** en gazeto VICE, ĝi enhavas intervjuon kun M. Malovec; Milan Kolka preparis tabloludon **Abecedino** kun bildetoj de Oldřich Arnošt Fischer. Jan Werner esperantigis libron de Jiří S. Kupka **Sangofragoj** pri s-ino Věra Sosnarová, kiu transvivis gulagon. La eldonejo Sezonoj eldonis libron **Nia diligenta kolegaro**, kun ĉeĥaj gravuloj T. Čejka, S. Kamarýt, F.V.Lorenz, K. Píč, E. Urbanová (prilaboris M. Malovec). Li prilaboris ankaŭ 36 medalionojn de gravaj ĉeĥaj esperantistoj por Literatura Instituto de Akademio de Sciencoj. Forpasis niaj membroj **Antonín Bretšnajdr** (16.2.), **MUDr. Vladimír Škoda** (4.3.), **Anna Veselá** (10.8.), **Milada Vondroušková** (26.8.). En **Almanako Lorenz 2018** eldonata en Rio de Janeiro aperis artikolo de M. Malovec **VEDEM – la vivo de infanoj kaj plenkreskuloj en la koncentrejo Terezín** (samvolume

ankaŭ artikolo de Jarmila Rýznarová el la klubo Pardubice: *Mia unua vojaĝo okcidenten*). La 7.11. filmis en nia klubejo **Ĉeĥa Televido** (redaktoro Petr Kotrla kaj kameraisto Jonáš Nepustil), el unuhora filmado estis **kelkminuta raporto** 20.11. je la 7-a matene ĈT2 en la programo *Dobré ráno* (Bonan matenon) pri la hungaraj lingvo kaj kulturo (Esperanto enmetita kiel alia interesa lingvo). Oldřich Arnošt Fischer verkis kaj eldonis libron **Je subniaj piedoj...** pri la svarmanta surtera mondo de senvertebruloj. Li prelegis ankaŭ en ekumena esperantista kongreso en Poděbrady (6. – 13.8.) pri Biblio de Kralice kaj en la kongreso de Rumana Esperanto-Asocio en Gherla (14. – 16.9.) pri libeloj. Milan Kolka funkciigis la **kluban butikon** (<http://butik.esperantobrnno.cz/>). Estis nuligita nia konto ĉe Poštovní spořitelna kaj restis nur FIO. Jarfine SAT eldonis libron **Antaŭ unu jarcento. La granda milito kaj Esperanto** kun kontribuo de M. Malovec pri Kilian kaj lia statistiko, ke UEA dum la unua mondmilito peris 170 000 leterojn inter homoj, kiujn disigis la milito. En KAEST (Modra, 18. – 21.10.) prelegis M. Blahuš (**Genetika genealogio**), M. Malovec (**Kiamaniere oni faras vortaron**) kaj Václav Zouzalík (**Autoraj rajtojn nuntempe, Libereco en interreto**). Ligita kontakto kun la eldonejo de ing. Vladimír Filip, kiu kiel infano partoprenis kursojn en Lančov (**nomo de la eldonejo laŭ lia patro**).

2019: la 15-an de januaro en Ĉeĥa Televido ĈT2 programo Bonan matenon (6 – 8 horo) Marek Blahuš estis **intervjuata** pri Vikipedio, genealogio kaj Esperanto. La 5-an de februaro mortis **Věra Podhradská**. La 18-an de marto la opero Sternenhoch ricevas Premion de Teatra Kritiko pro la muziko de Ivan Acher kaj Tereza Marečková (rolanta en la opero) estas proklamita Talento 2018. La 13-an de majo aperis gazeto Týden (Semajno) 21/2019 kun granda artikolo de redaktorino Barbara Jelínková pri la ĉeĥa Vikipedio: estas menciitaj du niaj membroj, M. Malovec (kiel fondinto per traduko de surskriboj el Esperanto) kaj M. Blahuš (kiel sola ĉeĥa profesia vikipediisto). Simila artikolo aperis en Mladá fronta Dnes, n-ro 34, redaktoro Daniel Páček. La 23-an de majo 2019 M. Malovec **prelegis** pri Esperanto-tradukado en sukeraĵejo sub la **Turo** en Frýdek-Místek post koncerto de Ivan Acher, Jana Věbová a Vanda Šípová. La 29-an de majo 2019 J. Vojáček instalas **ekspozicion pri Esperanto en Masaryk-universitato** (en t.n. kampuso) en **koridoro inter rondaj fenestroj** de la biblioteko. La 18-an de junio **lanĉo** de nova libro de ing. Filip kun ĉapitro pri Esperanto en Brno en Moravia Landa muzeo. En UK 2019 (Lahti) estis al M. Malovec atribuita *Diplomo pri Elstara Arta Agado* pro esperantigo de Sternenhoch. En **biblioteko Mahen** lanĉo de **memuaro** de Martin Stuppnig kaj **ekspozicio pri Esperanto** (2. – 31.10.). Inter 17. – 20.10. **ĈEA-kongreso en Brno** (Čichnova). O. A. Fischer eldonas libron **Ekkompreni neparolantojn** kaj jubilean bildkarton. La asocio eldonas **Ĉeĥa Esperanto-Asocio en la jaroj 1969 – 2019**, preparis M. Malovec. Vizito de **japana esperantisto** Kobashi Ryotara, kuracisto el Kioto (2.11.). Malovec ciferecigis plejparton de verkaro de forpasinta Josef Kavka kaj skanis materialojn post V. Podhradská kaj Z. Hršel (tiujn transdonis la filo J. H. en novembro).

2020: Nur januare venis la atribuita **Diplomo pri Elstara Arta Agado**. (*Ivan Acher ricevis la 7-an de marto Ĉeĥan Leonon pro la plej bona muziko – filmo Lernanto de Horloĝisto – , kio pruvas, ke la aŭtoro de la esperantlingva opero estas ekster-ordinara artisto*). La 5-an de februaro **jarkunveno** de la klubo. La agadon de la klubo paralizis kronviruso, sed tio ne haltigis laboron de unuopaj esperantistoj hejme per komputiloj (ekz. esperantigado de Prestashop, skanado de materialoj, ciferecigado de malnovaj tekstoj ktp.). Agrable nin surprizis **Memorejo de Moravia Literaturo en Rajhrad**, kiu preparis ekspozicion pri František Kožík kiel pri verkisto kaj esperantisto (sen nia helpo – sed jam estis ligita neformala kunlaboro, transdonitaj kelkaj publikaĵoj, konatiĝo kun la filino de la verkisto). **J. Werner** foriris en majo al seniordomo Modřice, siajn librojn kaj manuskriptojn donacis al la klubo (10 bananskatoloj), kiuj estas prilaborataj (trovita foto kun 13-jara poeto Ivan Blatný). **Klubejo en Starobrněnská** junie definitive likvidita, ekde septembro la klubo kunvenas

en **klubejo de Křenová 57**, marde 18 – 19 h. Bedaŭrinde post tria kunveno la klubejo estis denove fermita pro kronviroso kaj **la klubanoj kunvenas nur virtuale** sub teknika gvido de M. Kolka – foje kiel interparoloj, foje kiel antaŭfilmitaj prelegoj (O. A. Fischer). Al **Muzika fako de Nacia Biblioteko en Prago** liveritaj kopioj de muzikaj materialoj el nia kluba arkivo (tradukoj de J. Kořínek kun notoj adaptitaj de V. Scheiber kaj medalionoj de tradukantoj) kaj al **Muzika Muzeo en Prago** liveritaj kantaretoj kun traduko de ĉeĥaj popolkantoj. Milan Kolka kaj Miroslav Malovec esperantigas programon Prestashop por retaj butikoj. Malovec parigis 8000 ĉeĥajn kaj Esperantajn arbaristajn terminojn kaj enkomputiligis vaporturbinajn terminojn de M. Tůma. Milan Kolka fondis kluban pagon ĉe **Eventa Servo**. Aŭtune Malovec esperantigis por KAVA-PECH du librojn (Kosmofabeloj, Desegnita humuro 2) kaj preparas revizion de Ĉeĥa-Esperanta Vortaro de Kraft. La kluba biblioteko kreskis je ĉ. 400 libroj donacitaj de J. Vojáček, F. Horáček kaj J. Werner. En la kluba retejo pri historiaj bultenoj aperis novaj numeroj de Medicinaj Informoj, Praga bulteno, Verda Familio kaj Esperanta Vorto de Lanškroun (danke al eksterklubaj tajpistinoj J. Malá, A. Švubová, A. Gybasová kaj E. Pazourková).

2021: Jaro de la **120-a datreveno** de la klubo. O. A. Fischer omaĝe al la datreveno preparis libron **El mirinda mondo de dipteroj (Insecta, Diptera)** kaj jubilean bildkarton. M. Malovec verkis por monografio pri R.U.R. preparata de Instituto por Ĉeĥa Literaturo de AS ĈR artikolon **R.U.R. kaj esperantské divadlo u nás**. Plie li tekstigis du radiokursojn de Th. Kilian el la jaroj 1933 kaj 1933, elsenditaj de Verda Stacio Brno (en la kluba retejo *elŝutu*) kaj estis telefone intervjuata de redaktorino el la gazeto Deník N pri la fondo de la ĉeĥa Vikipedio en 2002. La klubaj kunvenoj estas daŭrigataj virtuale, gvidas M. Kolka, kiu preparas Invitilojn, registras la prelegojn kaj publikigas en Jutubo. Milan Kolka akiris konsenton esperantigi tabloludon Kodaj Nomoj. Miroslav Hruška prezentis sian projekton de Arbarista Panteono ([Lesnický Slavín](#)), kiu estas parte en Esperanto. Forpasis inĝ. **Jan Werner** (la 20-an de januaro). Virtuala jarkunveno elektis novan komitaton: Milan Kolka (prezidanto), Miroslav Malovec (vicprezidanto), Oldřich Arnošt Fischer (sekretario), Bohumila Trzosová (kasistino). Reta gazeto Literka de Monumento de literaturo en Rajhrad [en januara numero](#) publikigis intervjuon kun Malovec (Miroslava Šudomová, Libor Kalina), similan intervjuon registris Lucie Hostačná el radio Brno por programo [Apetýt](#) (16.2.). En aprilo la klubo subtenis per adopta kontribuo surikatojn kaj agamon en ZOO Brno (22.6. la klubanoj [vizitis](#) en ZOO siajn adoptitojn). En la Tago de Esperanto la 26-an de julio la Ĉeĥa Televido invitis Marek Blahuš al programo „Bonan matenon“. Li havis tri enpaŝojn: [6.20](#) – [6.55](#) – [7.40](#).